

n-ro 31

Julio 1990

La Merkato

I nternacia

K omerca kaj

E konomia

F akgrupo

Esperanta Indekso al Komerca Terminaro

IKEF havas la plezuron oferti al siaj membroj indeksojn por la *Proveldono de Komerca Terminaro* (KomTo), kiun ĝi aperigis antaŭ unu jaro. Ni esperas, ke ĝi estos utila helpilo dum konsultado de KomTo.

Eble vi ne jam aĉetis la terminaron? En tiu kazo vi havas (ĝis oktobro) la ŝancon mendi ĝin je favora prezo: 450 belgaj frankoj (\pm 13 usonaj dolaroj) inkluzive de sendokostoj. Vi povas sendi vian pagon al unu el la kontoj menciataj sur la dua paĝo (ĉe "Kontoj:").

Cu vi konas personojn, kiuj havas intereson por iĝi membro de IKEF? Ankaŭ por ili estas interesa propono: Per pago de 1000 belgaj frankoj (\pm 29 usonaj dolaroj) ili ricevos la terminaron, la indeksojn kaj la membrecon de IKEF ĝis fino de la jaro 1991.

Enhavo:

Estraro, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj	2
Saluton	dk 3
Informkunvenon dum la 75a UK	wb 4
Serĉataj fakuloj emeritaj aŭ liberaj	FXG/dk 4
Esperanta skribmaniero en LM	FJB 4
UNU JARON POSTE	Wiersch 5
KION FARI ?	FXG 6
Seminarioj pri terminologio	RR 7
KION FARI POR ENIRI FAKMEDION ?	Pirlot 8
Subjektiva eltiro el la letero de Hans Wiersch al FEL okaze de ĝia strategia alvoko	dk 10
Esperanto en la "INSTITUCIO POR FORTIGI LA VENDISTOJN"	FXG 12
FAIB kaj MAI, du utilaj, sed malpli konataj instancoj en Belgio	RR 13
Diversaĵoj	RR, dk 14
Eŭropa Komunumo eldonis broŝuron pri "EDI"	RR 15
Plena Pekoteko 1985 -1990	RR 16
Bonvenon; Reklamtarifoj 16

La Merkato (LM) estas organo de IKEF; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether; S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ce s-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membro-administrado:

Ce s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono: +32.(0)50.330004

Redaktora sidejo:

Ce s-ro Daniel König, Schwarzwaldstraße 47 D-6800 Mannheim 1, FR Germanio, telefono: +49.(0)621.821710

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

Kontoj: Ce UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c, aŭ ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

Perantoj:

Francio: S-ro François-Xavier Gilbert, Vert Coteau, F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)

FR Germanio: S-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István Gether, Berényi ul.8 I/6, H-1027 Budapeŝt

Italio: D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro Seikō Yamasaki, 185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĉirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)

Jugoslavio: S-ro Sotir Taleski, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje

Svislando: S-ro André Piérard, Chemin des Voirambeys, CH-3974 Mollens, (Poŝtĉekkonto, n-ro 19-33545-3)

Togolando: S-ro Gbeglo Koffi, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

Saluton

Estimataj gesinjoroj,
karaj gelegantoj,

nur malmultaj IKEF-membroj reagis al la proponita nova signo. Tiuj, kiuj donis sian opinion bonaprezis kaj tute aprobis la daŭran uzadon de la nova titolpaĝo.

La hoketoj iĝis gravaj, almenaŭ al kelkaj de ni. Mia opinio ni agu pli liberale, precipe tiurilate. Al mi ne ŝajnas tre grave, ĉu la hoketo super la "u" (ekz. en ankaŭ) estas la ĝusta hoketo aŭ iu alia supersigno, kiu kelpas distingi la du diversajn literojn. Kvankam mia vidmaniero lingvistike kongruas en tiu punkto kun la "laŭFundamenta uzado" de s-ro Hans Wiersch, mi certas, ke s-ro Bernhard Pabst supere punis la aŭtorojn de KomTo (Komerca Terminaro) en sia recenzo en la revuo Monato.

Kiel vi verŝajne rimarkis mi lastfoje tiuloke (paĝo 3) iomete ludis kun la diakritajn signojn. La Esperanta literaro ja havas kelkajn pliajn literojn. Avantaĝe por la lingva klareco. Sed, domaĝe ĝi aliflanke kaŭzas problemojn. Ekzemple: komutoroj ofte funkcias kun la ASCII-kodo, kiel ĉefa kodaro por literoj. Kaj, la normigintoj de la ASCII-kodo ne konis Esperanton. Verŝajne multajn el vi tion jam sciis, ke la Esperantaj diakritaj signoj tute mankas. Oni ĉiam iel trukas, skribi Esperante sur kutimajn IBM-kongruajn aparatojn. Depende de la softvaro ĝi estas pli aŭ malpli nekomforta generi ilin. Anstataŭi la " ^ " per sekvanta " h " post la diakrita signo iĝis malkonvena, kaj min atingis proteston skribi tiele. Do, je mia komputoro mi ankoraŭ ne kontentige solvis la "Esperantan problemon" - la " sekvanta-h " ne tre plaĉas al mi.

La alvoko de FEL (Belga Esperanto-Federacio) por ricevi respondojn al ok "fundamentaj demandoj", menciitaj sur paĝo unu ĉe la antaŭa LM ankoraŭ validas. Tiurilate poviĝas en la ĉi-tiea numero pluraj artikoloj. Strategiaj ideoj estas ŝlosilo bezonata inter pluraj por vera sukceso. "Pli malpli samopinas" mi, kaj pro tio enmetas la sugestojn de s-ro Germain Pirlot. Li letere skribis: "Tro longtempe restis Eo en la manoj de klubemaj amatoroj; nepras profesiigi ĝian uzadon por ke finfine ĝi allogu! Li ne mensogas.

Agrablan legadon deziras

Daniel König

/dk

IKEF okazigis informkunvenon dum la 75a UK en la Havana, Kubo 1990.

"La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo aranĝis sian kongresan kunvenon en ĉeesto de 20 membroj kaj gastoj sub prezido de estrarano Yamasaki. Unua temo estis la fakaj ekskursoj, pri kiuj la koncernaj ekspertoj eksciis nur surloke en Havano el la Kongresa Libro. Tial bedaŭrinde la partopreno en la vizito al la Kuba Komerca Ĉambro estis malmultenombra. D-ro Bormann raportis pri ĝi. La ĉeestantoj klopodos estonte pli bonan vizitadon.

Dua temo estis la terminologia laboro. Listo de mil fakvortoj de la Internacia Ĉambro de Komercado, nun tradukitaj en Esperanton, estas je dispono por Esperantistoj volontaj kontribui per siaj spertoj. Trie kaj fine la ĉeestantaj komercistoj pritraktis siajn eblojn negoci per Esperanto, kiuj estas nun etaj. /wb"

/el "La Havana Kuriero" (kongresa kuriero) n-ro4.

Serĉataj fakuloj emeritaj aŭ liberaj

Multaj fabrikoj, entreprenoj, institucioj, k. s. serĉas alilandajn fakulojn por solvi teknikproblemojn en ĉinio. La profesio de s-ro Wang Xigen estas enkonduki eksterlandajn intelektulojn en ĉinio. Se vi estas emerita aŭ libera fakulo parolanta Esperanton, bv. anonci vin al:

S-ro Wang Xigen, Shitai-xian Ren-shi-jun,
ANHUT, CN-245100, China P. R.

Post sukcesa pritraktado kun koncernantaj firmaoj oni invitas vin kaj provizas al vi internacian vojaĝkostojn kaj pagas al vi salajron laŭ la interkonsento. FXG/dk

Esperanta skribmaniero en "La Merkato"

En sia enkonduka artikolo en "La Merkato" n-ro 30, paĝo 3, nia redaktoro uzis la "h" anstataŭ la supersignoj, ekzemple "ghia", "tiu chi", "titolpagha". Sajnas al mi, ke li volis nin ŝoki per tio, kvazaŭ veki nian atenton - kio certe estas pardonebla - , ĉar lia komputoro ja disponas la "h" - vidu la aliajn paĝojn.

Mi opinias, ke IKEF principe apliku la supersignojn. Tion ankaŭ preskribas nia statuto, ĉar ĉapitro 5 diras: "La oficiala lingvo de la Fakgrupo estas Zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per la Fundamento de Esperanto kaj oficialigita per la Akademio de Esperanto". Ni lasu la eksperimentojn pri modernigo de nia lingvo al aliaj instancoj kaj uzu nian raran tempon por disvastigi Esperanton en komercado kaj ekonomio. /FJB

Unu jaron poste

Dum la UK en Brajtono/Britio IKEF prezentis 1989 la proveldonon "Komerca Termonaro", la seslingvan fakvortaron surbaze de la kvinlingva "Key words in international trade" (Internacia Komerca Ĉambro Parizo). En la antaŭparolo ni petis pri modifaj proponoj precipe koncerne la aliajn etnolingvajn nociojn. La reagoj estis malabundaj. Ni tamen hodiaŭ ankoraŭfoje petas pri tralegado kaj proponoj.

Bedaurinde ni trovis en "Monato" kaj "Esperanto Aktuell" (GEA) recenzojn de iu Bernhard Pabst kun titolo "Utila verko kun aĉa makulo", do titolo kiu malhelpas plian bonan vendadon.

Kaj kial ĉio ĉi?

Ĉar mia elektronika, ne malnova skribmaŝino per kiu mi enskribis en la bazan presadon la esperantigitajn esprimojn kaj kelkajn modifitaĵojn pri etnolingvaj terminoj ne posedas la hoketon super "u". Sekve de tio mi ellasis la hoketon rilatante al la rekomendo de Doktoro Zamenhof en la Fundamento. Do, mi agis absolute laŭ Fundamento!

Kial oni recenzis nian verketon uzante ĉ. unu trionon de la recenza artikolo pri tiu temo kiu neniel estis aĉa makulo de la Sekcio Terminara de IKEF sed estis aĉa makulo de recenzisto?

Bedaurinde ne nur Bernhard Pabst atakis nin, sed pro aliaj de skribitaj tekstoj ankaŭ Stefan Maul, redaktoro de "Monato", kaj finfine (au pli bone dirite kiel unua) nia iama estrarano Lawrence Mee. Sed ĉu vi scias kion li faris en sia letero? Li metis tildon (!) super la "u"! Nenie en la Fundamento au alia kompetenta libro estas skribite anstataŭigi la hoketon super "u" per aliaj diakritaj signoj. Se Doktoro Zamenhof en la Fundamento proponis ellasi la hoketon li certe havis kialon. Li siatempe jam antaŭvidis ke tiuj kiuj lernis Esperanton poste bonege sciis kiel prononci "eu" kaj "au". Tralegu iujn ajn tekstojn kaj vi konstatas ke aliaj versioj (balau, praulo ktp.) estas tre maloftaj.

Nu, malkaŝe dirite, la hoketo super "u" estas superflua. Ĝi ĝenas fluan skribmanieron kiu certe estas necesa dum la skribado por ekonomio kaj komercado kaj ... per komputoroj!

Estas ankaŭ rekomendinde anstataŭigi la cirkumfleksojn per la aldona "h", sankciita de Doktoro Zamenhof en la Fundamento. La ellacoj de diakritaj signoj estus avantaĝaj en nia sfero, estus progresivaj por nia nuntempa laboro. De Doktoro Zamenhof antaŭ cent jaroj donis utilajn rekomendojn, ni uzu ilin favore al la progreso de Esperanto en nia sektoro.

Kial komplikigi Esperanton se ekzistas Fundamentajn eblojn pri simpligo?

/HW

KION FARI ?

Ofte mi ricevis perletere tiun ĉi demandon : kion fari por atingi disvolviĝon de la internacia lingvo Esperanto en la kampo de la ekonomio.

Mi respondas:

la ĉefa agado estas fareda en nia propra menso kaj en nia propra cerbo. Fakte, la grandaj motoroj de la esperanta movado estas: mondiskala humanismo kaj senpaga propravoleco! Do devus okazi vera spirita revolucio, ĉar en la komerca kampo la celoj estas : merkata superregado kaj grava profito ! En Esperantujo, oni malfacile akceptas tiujn, kiuj provas komerci dank'al la vivo de la movado. Laŭdire, la diversaj instruantoj kaj gvidantoj ne rajtas peti monon pro sia laboro. La kotizoj ŝajnas ĉiam tromulte kostaj kaj tiamaniere la kluboj povas nur agadi malforte kaj ofte per nefidendaj metodoj .

la esperanta familio devas esti uzata kiel reto por multoblige la ekonomiajn interrilatojn inter la uzantoj de la internacia lingvo, sed necesas ankaŭ malfermi tiun reton al la neesperantistaro kadre de komercajn kontraktojn alportantaj profitojn al la du partneroj. La uzado de la esperanta lingvo ne povas esti kondiĉo por komerci; iom post iom, se la esperantisto , kiu iniciatis la kontrakton, trovas por si mem avantaĝon al la uzado de Esperanto, tiam ŝajnas al mi ke la alia certe ankaŭ serĉos ŝpari monon kaj tempon uzante Esperanton. Ne plu la idealo gvidas la homojn en la komerca kampo, sed la vera konkurenco. La babilado pri la supereco de la internacia lingvo estas for..., ĉu tiu supereco estas pruvebla kaj mezurebla? Tie kuŝas le kerno de la problemo.

ni ĉiuj senescepte devas iniciati dekojn kaj dekojn da etaj agadoj en nia propra eta angulo de la tero. Fakte, se ekzistus unu nura rimedo por respondi al tiu demando , ekde longe tiu ĉi estus uzitita kaj la demando " kion fari? " delonge jam for malaperis. Ni devas profiti de niaj profesiaj prirespondecoj, privataj rilatoj, por enŝovi la ideon, ke eble estas ŝparoj en tiu uzado kaj eblas demonstri aŭ pruvi tion ĉi. Kelkajn ekzemplojn mi tuj donos al vi .

1°-Mi estras la servojn de la komerca kaj industria ĉambro de la departemento MEUSE en FRANCO; estas duonŝtata profesia organizo . Antaŭ tri jaroj, la estraro decidis eldoni broŝuron pri la diversaj produktaĵoj de nia tri cent la plej gravaj firmaoj; mi klarigis al la prezidanto, ke en la kadro de la unika eŭropa merkato, la uzado de Esperanto povos helpi por la disvolviĝo de la informado. Li permesis al mi uzi la internacian lingvon en tiu libreto, kiu aperis en 7000 ekzempleroj.

2°-Antaŭ du jaroj, nia ĉambro kreis komercan lernejon. Mi diskutis kun la direktoro de la tiel nomata " Institucio por

Fortigi la Vendistojn " klarigante ke en la movado, oni emfazas ke la lernado de esperanto estas dek pli rapide ol por la angla; do ni decidis provi kaj tiamaniere eble pruvi tiun ĉi aserton . Kun la unuaj samklasuloj, la provo tute fiaskis pro manko de sperto post dudek horoj; la sekvantan jaron, ni denove enŝovis Esperanton en la devigaj lernobjektoj. Nun ŝajnas ke tio ĉi funkcias bone kun dek kvar gejunuloj. Kelkaj el ili ĵus komencis korespondi kun Ikefanoj, kiuj konsentis interŝanĝi leterojn kun ili. .

3°-La prezidanto de IKEF, aĉetsekciestro de la firmao BOSCH , uzas sian oficon por reklami esperantlingve en " Monato " montrante la interesiĝon de tiu ĉi grava entrepreno pri la internacia lingvo. Profesie, li vojaĝis en Hong-Kong kaj Ĉinio por negoci diversajn aĉetaĵojn ; li uzis la servon de la membro de la Ikefa reto, sinjoro LEE, kaj li atestis en sia raporto pri la efiko de la negocadoj dank'al la konoj de S-ro LEE.

4°-Kelkaj kleraj Ikefanoj tradukis Esperanton la leksikon eldonitan de la Internacia ĉambro de komerco, rilate al 848 esprimoj pri la internaciaj komercaj rilatoj. Ikef eldonis tiun seslingvan kajeron je tricent ekzempleroj, kiujn oni vendas al la membraro de la asocio.

5°-Interrilatoj kun etkooperativo en Hungario, traduklaboro por franca entrepreno ...mi devas ĉesi!

Do, antaŭ ol malesperi, ni demandu al ni : kion mi konkrete faros morgaŭ dank'al la Ikefa reto, ĉar ĝi sufiĉas grande por fari ion, sed kion? Vi devas trovi kion fari laŭ via medio, sed pensante al tiuj ĉi supraj rimarkoj. Nun tiu reto enhavas pli da naŭdek homoj, kaj estas aparta kajero, kiu donas multajn informojn pri la Ikefanoj, kiuj deziras forte komerci pere de la reto. Do la sukceso apartenas al la imagopovo kaj la aŭdaco kiel ĉiam en la dura kampo de la komerco. Tie ĉi ne estas loko por la songuloj !!!

François Xavier GILBERT

Seminarioj pri terminologio

En sia bulteno n-ro 6 (1990) TEC (Terminologia Centro de UEA, p. k. 499, YU-41000 Zagreb) anoncis jenajn aranĝojn, kiuj povas interesi IKEF-anojn. En ĉiuj kazoj la laborlingvo estos la angla.

- Trier (Germanio): 2. - 4. oktobro 1990, Terminology and Knowledge Engineering, i. a. pri elektronikaj vortaroj. Informoj haveblaj ĉe TEC kaj Roland Rotsaert.
- Kuala Lumpur (Malajzio), TERMPAN 90 (International Conference for Terminology Planning). Informoj ĉe la sekretario: S-ro Ismail Othman; Terminology Division; Dewan Bahasa dan Pustaka; Malaysia, P. O. Bos 10803; 50926 Kuala Lumpur.

/RR



KION FARI POR ENIRI FAKMEDION ?

- ĉu preĝi ?
- ĉu teoriumi ?
- ĉu agadi ?
- ĉu ... ?

KONSTATO

- 1) Sen aplikado ankau por fakceloj, Eo neniam amase allogos, ĉar ne estos forta motivigo por ek- kaj el-lerni ĝin;
- 2) La plizulto el niaj E-fakasocioj estas nur surpaperaĵoj, kies agado estas tro ofte sensignifa;
- 3) Grava eraro estus daŭre agadi en "verdaĵ getoj" sen iu ajn kontakto kun ne-E-istaj saafakuloj.

KION FARI ?

- 1) Daŭrigi la ĝisnunan agadon, sed laŭeble plivigliĝi ĝin.
- 2) Starigi kontaktojn kun saafakuloj per
 - tradukado de fakartikoloj el Eo por proponi al ne-E-istaj fakbultenoj, -revuoj;
 - tradukado de fakartikoloj el nacilingvoj por proponi al E-fakbultenoj, -revuoj;
 - prizorgado de diverscela korespondado inter E-istaj kaj ne-E-istaj fakuloj;
 - informado al ne-E-istaj fakuloj pri fak-seminarioj, -konferencoj, -kongresoj, kies laborlingvo estos (ankau) Eo.

Rim.: NENIAM nia celo estu esperantigado de la kontaktitaj homoj, kiuj sen interesigos pri Eo se nia kunlaborado estos fruktodona.

- 3) Instigi E-fakulojn al ĉeesto en internaciaj fak-konferencoj, -seminarioj, -kongresoj, eĉ se inter la laborlingvoj ne troviĝas Eo
 - kaj - aktive partopreni en la laboroj, debatoj por pruvi sian fakkompetentecon;
 - neniel propagandi por Eo, sed nur uzi ĝin kun alilingvaj E-istoj dum paŭzoj, en la koridoroj, dum manĝoj, k.s.; ĝenerale tio sufiĉas por vekti intereson, al kiu ni respondu, NE per fanatika propagando, sed per racia, objektiva informado, sen tedi;

- organizi apartan kunvenon por le E-partoprenantoj (vespere, antaŭ kaj/aŭ post la konferenco) por pritrakti i.a. la uzotan strategion, fari bilancon, pretigi laborplanon, ktp.

Rim.: kunordigu tian agadon estrarano aŭ (loka) komisiito de la rilata E-fakasocio, se ĝi ekzistas.

AVANTAĜOJ

- 1) Ne-E-istaj fakuloj kontaktiĝos nature kun Eo, se verdaĵ fanatikuloj (la movada plago) ne fiaskigas la agadon!
- 2) Sufiĉas havi kunordiganton (LKK), kiu nur prizorgu rilatojn inter la E-partoprenantoj; konferencoj, programo, loĝado, subvencio, ktp. estos zorgoj por la ne-E-organizantoj.
- 3) Laŭ la nombro, la serioseco, la aktiva kunlaborado de la E-ĉeestantoj, ni povos peti, iom post iom
 - ke Eo fariĝu ankau laborlingvo, eĉ parte, dum onta kongreso;
 - ke estu E-angulo en bulteno/revuo de la asocio.

Rim.: ni estos tre singardaĵ en niaj petoj, des pli ke, por multaj fakoj, la terminologio en Esperanto NE estas kompleta aŭ ĝisdatigita.

KONKLUDO

En fakmedioj, la FINcelo estu ke Eo fariĝu laborlingvo samrajte kun alia(j) nacilingvo(j).

P.S. - Se vi pli malpli samopinias, fotokopiu kaj diskonigu tiujn pripensojn. Antaŭdankon.

Germain PIRLOT
Steenbakkersstraat 21
B-8400 OOSTENDE
Tel. 32-59/70 87 00

Subjektiva eltiro el la letero de Hans Wiersch al FEL
okaze de ĝia strategia alvoko

S-ro Hans Wiersch letere respondis amplekse al la demandoj menciitaj sur la titolpaĝo de LM n-ro 30. Li afable sendis kopion de tiu letero al mi kaj permesas aŭ plenan aŭ partan aperigon. La eltiro certe estas subjektiva; ĝi reprezentas la miaopinie plej rimarkindajn partojn.

"La venonta Esperantisto volas ... scii kial li lernu Esperanton, ne por libertempismo ktp., sed por profiti el tio iom por la profesio, por la vera praktiko."

"IKEF interalie havas la celon aldoni esperantigitajn nociojn al ekzistantaj vortaroj kaj terminaroj por enŝovi Esperanto ĉien ajn. La Eŭropa Komisiono havas pli ol 50 plurlingvajn terminarojn. Al unu el ili IKEF aldonas IKEF aldonas la Esperantajn nociojn (Economie - Finance - Monnaie). Multe da laboro! Sed kiu helpas ĉe la Esperanta kompletigo de la aliaj vortaroj? Jen estus avantaĝa agado por montri al EK, ke Esperanto povas esti la pontlingvo por Eŭropo."

"... Esperantaj informiloj ĉesu malglori la politikistojn.

... Se ni deziras ilian helpon ni devas trakti ilin bonvole."

"Por ... montri nian pacemon interpopolan la Esperantistaro unue devas ordigi la proprajn vicojn kaj ĉesi la inter-Esperantistajn kverelojn.

... Mi atentigas al la kverelaj artikoloj pri lingvosciencaj bagateloj (-ita/-ata; propraj nomoj; landnomoj; ktp. ktp.) Multe da paperoj estas vane uzataj kaj vekas ĉe neŭtralaj observantoj la impreson, ke la Esperantistaro estas aro malpaca."

S-ro Wiersch proponas novajn sloganojn:"

- Esperanto fariĝos la pontlingvo por Eŭropo. (Tute optimiste!)
- Esperanto estas facila peranto en la komerco kaj en la ekonomio.
- Por apudprofesia aktiveco la popolaltlernejoj serĉas docent(in)ojn. Tiuj institucioj volonte ofertas Esperanto-kursojn, se bonaj Esperantistoj deklaras sin pretaj instrui."

"Certe ni trovos pliajn argumentojn konvinkeblajn.

Kion ni do faru konsidere nian malaltan nivelon en niaj kaso?

Proponoj po varbi novajn membrojn, kiuj pagos kotizojn:

- Ciu reklamu kaj varbu!

Ekz. etiketoj sur aŭtoj aŭ sur aliaj iloj; raportoj en gazetoj; pli da eksplikaj dialogoj pri Esperanto kun tiuj, kiuj ankoraŭ nenion scias pri Esperanto; paroli kun labordonantoj por uzi Esperanton dum la vendado (helpo donos IKEF post ekkontakto); verki suplementan tradukon de urbprospektaj tekstoj por aldoni al nacilingva eldono (la urbestroj estas dankemaj pro tiu reklamo por la urbo aŭ laĝo).

- Nacilingvaj informiloj pri Esperanto por tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas en ligoj kaj grupoj, kaj alsendo al ili de tempo al tempo. El mia propra sperto mi povas raporti, ke nia loka Eo-grupo tion faris ĉi tie helpe de urbestro kaj firmaj mecenatoj (la urba administracio permesis, ke ni senkoste povis uzi la multobligilon). Kompenso: en unu paĝo ni reklamis por la urbo. Plue ŝparkasoj kaj firmoj donis etajn sumojn por kovri la elspezojn de materialo, afranko ktp. Ni kompensis per anoncetoj. Jen ebloj por malmultekoste reklami kaj varbi!

Ankoraŭ kelkaj ideoj jam faritaj per la IKEF-agado:

- aldoni Esperantan tekston al firmaj prospektoj kaj instrukcioj pri uzo kiuj ofte estas plurlingvaj;
- en nova germanlingva leksikono pri publikaj rilatoj ni faris artikolon pri 'publikaj-rilatoj-komunikilo Esperanto' kaj 14-paĝan glosaron kvarlingvan kun Esperanto;
- projekto: Eo-lernolibro por komercistoj;
- ekkontakti kun fakaj akademioj.

Ĉi tiu estas nur kelkaj ideoj kaj proponoj de mia flanko. Se ni ĉiuj ŝanĝos nian reklamon tute konscie al la celo ke Esperanto estas tre bona por venonta profesio, ni certe havos sukceson kaj pli da membroj. La libertempisma Esperanto devas retiriĝi en la duan vicon. Ne plu titola bildoj kun avinoj, porinfanaj ĉaretoj kaj libertempaj grupoj! Tio nur alogos (eble) kelkajn interesulojn, sed ni bezonas ankoraŭ pli, por ke Esperanto estu estimata ankaŭ en aliaj rondoj.

Sincere salutas vin

Hans Wiersch

/dk

Esperanto en la "INSTITUCIO POR FORTIGI LA VENDISTOJN"

I.F.V. komerca lernejo de la komerca kaj industria ĉambro de MEUSE en BAR LE DUC.

Duajare, la internacia lingvo Esperanto estas inkluzivita en la diversaj devigaj lernobjektoj. Dekkvar gejunuloj studis ĝin kun granda intereso. La tuta ciklo enhavas kvardek horojn. Post la sperto de la pasinta jaro, ni decidis adapti la progresadon kaj doni al ni konkretajn celojn anstataŭ rapida libra lernado.

Tiel, la unua fazo ambicias doni sufiĉe da bazaj elementoj por kapabli la lernantojn skribi al eksterlanda korespondanto, kiu apartenas al la komerca reto de la tutmonda asocio I.K.E.F., kiun estras la aĉetsekcestro de la germana firmao BOSCH. Post naŭ horoj de studado, la gejunuloj elektis korespondanton kaj preparis kolektive privatan leteron. Finfine nur kelkaj konsentis fini sole la privatan parton de la letero kaj sendi ĝin.

Interkonsente, la dua fazo estis pli dediĉita al la lego de teksto de la lernolibro de Triolle kaj Ludwig. Kompreneble estos certe pli efike uzi tekstojn pli adaptiĝitajn al la nunaj profesiaj zorgoj de tiuj ĉi gejunuloj, kiuj serĉas laboron kaj esperas trovi ĝin dank' al la studado en tiu institucio. Fine de tiu fazo, la gelernantoj trapasis la oficialan ekzamenon "atesto pri lernado"; 8 el la 14 kandidatoj sukcesis post kvardek horoj de studado. La notoj servas por la rezulto de la kompleta studado en la institucio.

La tria fazo konsistis en prelego farita de komercisto, kiu uzas Esperanton okaze de siaj profesiaj agadoj. Por fari tion, konsentis veni el Bühl en Germanio sinjoro Braun, prezidanto de IKEF, ĉisupre nomita. Dum unu horo li klarigis pere de transvidleblaĵoj sian profesion respondecon, sian vojaĝon al sudorienta Azio pere de Esperantaj korespondantoj; kaj larĝa diskuto instaliĝis inter li kaj la gejunuloj pri komerca kampo kaj ankaŭ politikaj aferoj, aparte la unuiĝo de la du Germanioj kaj la problemo de la landlimo Oder-Neisse. Sinjoro Gilbert tradukis la demandojn kaj kelkajn tro komplikajn respondojn. Sed la gelernantoj ŝajnis tre kontentaj ... tiom, ke ni devis haltigi la kunvenon!

Estas en Francio, la unua kaj sola provo de enŝovo de la internacia lingvo Esperanto en komerca lernejo. Tiu ekzemplo devos esti reproduktata alie por krei reton kaj ĝemeliĝo kun eksterlandaj keomercaj lernejoj. Ciu el ni estas koncernata kaj ĉio dependas de nia propra volo. Mi esperas ricevi de vi reagojn kaj proponojn. /FXG

Rim. de la red.: Tre validan kaj imitindan agadon s-ro Gilbert supre priskribis. Oni imagu, ke multaj dungantoj ricevas la sinproponojn de la partoprenantojn de tiu kurso. En tutoficiala kaj tutserioza atesto aperas - subite - Esperanto; inter pluraj aliaj devigaj lernobjektoj samrange.

La adreso de s-ro Gilbert troviĝas en la IDENTECŜILDARO kaj en la dua paĝo, ĉe "Perantoj: Francio: ...".

Krome: S-ro François-Xavier Gilbert ankaŭ estas la respondeculo por la kolektado de identecŝildoj. Membroj, kiuj ankoraŭ ne informis lin pri si, sin sentu invitata. /dk

FAIB kaj MAI

du utilaj, sed malpli konataj instancoj en Belgio

Car la Europa Komisiono kaj la Eŭropa Parlamento havas ĉefsidejon en Bruselo, tiu urbo pli malpli iĝas ĉefurbo de la Eŭropa Komunumo. Verŝajne tion kaŭzis la hazardo, sed eble la fakto ke Bruselo jam delonge gastigas multajn internaciajn asociojn favoris la establilon de la EK.

Jam antaŭ 80 jaroj fondiĝis en Bruselo Unuiĝo de Asocioj Internaciaj (UIA). En 1919 ekestis belga leĝo, kiu donas propran juran statuton al internaciaj organizoj. Antaŭ 40 jaroj kreiĝis Federacio de Asocioj Internaciaj establita en Belgio (FAIB). Laste, in 1982 fondiĝis *Maison des Associations Internationales* (MAI - Domo de Asocioj Internaciaj).

MAI nun havas du apudajn konstruaĵojn kun oficejoj, akceptejo (por 250 personoj), diversaj kunvenejoj (de 45 ĝis 200 sidlokoj, kun plej modernaj ekipaĵoj, i. a. por interpretado) kaj kinejo (16 mm) por 150 personoj.

Krom la ĉefaj iniciatintoj (UAI kaj FAIB), en MAI pluraj internaciaj asocioj havas sian sidejon kaj oficejon: AIESEC (studentoj pri ekonomio), YFU (Youth for Understanding), IAPCO (profesiaj kongresorganizantoj), ... La asocioj, kiuj luprenas ejon en MAI kune uzas la ekipaĵojn (fotokopiilon, telekson, telefakson ...) kaj tiel limigas siajn kostojn.

Internaciaj asocioj, kiuj ne kapablas pagi aŭ ne bezonas daŭran ĉeeston en Bruselo, povas uzi la "poŝtkestan servon" de MAI kaj FAIB: tiel oni havas adreson en Bruselo, kie lokaj oficistoj prizorgas administrajn formalizaĵojn kaj transsendas la korespondaĵojn al indikataj personoj.

Ankaŭ asocioj, kiuj havas sian oficejon aliloke en Bruselo aŭ en Belgio povas aliĝi al FAIB kaj uzi servojn de MAI aŭ simple ĝin internacian etoson.

Adreso: rue Washington 40, B-1050 Bruselo

Telefono: 2-640.16.65

Telefakso 2-649.32.69; Telekso 65080 inac b

/RR

Diversaĵoj

La firmao Witdoeck kaj la E-grupo "La Konko" el Oostende (Belgio) dankas ĉiujn, kiuj per iliaj sendaĵoj kontribuis al la konkurso. Oni kolektis pli ol 4500 E-sendaĵojn, tio estas trioblo de la antaŭa Guinness-rekordo! /RR

La kasisto kore dankas al la membroj, kiuj jam pagis iliajn kotizojn por 1990. Membroj kies kotizo ne jam alvenis je forsenddato, vidas atentigon sur la adresetikedo. /RR

Dum la lastaj monatoj IKEF ricevis multajn informpetojn kaj proponojn el orienteŭropaj landoj de personoj kiuj - pro pagoproblemoj - ne tuj povas aliĝi al IKEF. Ĉar la proponoj povas interesi la membraron, jen kelkaj adresoj:

- S-ro S. B. Mämmədov (Azerbajĝana Intru-informa kaj reklam-turisma entrepreno), SU-370146, Baky-146, a/k 3, telekso 142105 inam su-luch; informado, komerco, turismo, reklamo.
- Vojevodio Filio de Pola Esperanto-Asocio, ul. Strazacka 1, PL-06-400 Ciechanow, telefono 25-26; ĝenerala intereso.
- Inĝ Bacila Dan, Box 75, R-1800 Lugoj; kontaktoj ekonomiaj kaj etaferaj inter Rumanio kaj cetera mondo.
- S-ro Starkov Aleksand Konstantinoviĉ (°1950), SU-685000 u. Magadan, str. Dzerĵinskogo, 12-A, kv. 15; turismaj interŝanĝoj kaj servoj, aŭtomataj ludiloj, refabrikado de materialo, malgranda presejo.
- S-ro Stanislaw Staszewski, ul. Moniuszki 2, PL-95-070 Aleksandrow; deziras peri internaciajn komercajn kontaktojn inter Pollando kaj aliaj landoj; kapablas gastigi vizitantojn.
- S-ro Valentin Genchev, k. Krasno selo. bl. 215, v. h. E, Et. 2, ap. 96, B-1680 Sofia, Bulgario; inĝeniero pri radioelektroniko.
- S-ino Hanna Kwasniewicz, ul. Wieniawskiego 10/48, PL-43-110 Tychy; fabriko de ludiloj.

Se iu membro havas specialan intereson por iu lando, ŝi/li sciigu tion, por ke mi povu transsendi interesajn proponojn. Helpantoj kaj ideoj por subtena fondaĵo estas bonvenaj. /RR

Por komercaj kontaktoj profesie ankaŭ sin prezentis:

- S-ro Maciej Piegat,
01 914 Varsovio, Dantego 1-B/48, Pollando
- A.C.T., Hybernská str. 38,
CS-117 02 Praha 1, Ĉeĥoslovakio,
telefono: /02/ 236 43 95 / s-anino Květa Hubnová/
ligas kontaktojn al ĉirkaŭ 1000 agrokulturaj
kooperativoj (subskribis: d-ro Lubomír Straub). /dk



COVALEX S.A.

CHEMIN DES VOIRAMBEYS

- 3974 MOLLENS

(Svislando)

... JAM DE LONGE KONAS
LA FABRIKANTOJN DE LA ALTKVALITAJ PRODUKTOJ
KIUJ NUR EN SVISLANDO EKZISTAS
KAJ KIUJN VI NE ANKORAŬ TROVIS

...AŬ ELEKTRONIKAJ EROJ

...AŬ VINOJ

...AŬ ŜIPOJ

...AŬ BANKAJ SERVOJ

...AŬ ...???...ĈU NE ?

PROFESIE - FIDINDE - DISKRETE

ELDONAS KOMPUTERPROGRAMOJN (IBM AŬ KONGRUAJN)
ŜANĜAS, ADAPTAS ELEKTRONIKAJN INFORMOJN EL UNU
AL ALIAN SISTEMON (DISKOJ - DISKETOJ 8" + 5" + 3")

TELEFONO ++-41-27 / 41 62 45

TELEFAKSO ++-41-27 / 41 90 65 ("FAX")

Eŭropa Komunumo eldonis broŝuron pri "EDI"

"EDI" estas mallongigo de "elektronika donitaĵ-interŝanĝo" (aŭ elektronika dokumento-interŝanĝo). Eŭropa Komunumo stimulas diversajn tiurilatajn projektojn. Jus aperis broŝuro pri tiu temo. Gi estas senpage havebla, per resendo de la kupono. La temo tre gravas por internacia komerco, do ankaŭ por per-Esperanta komerco!



To Mr. R Wakeling, TEDIS, CEC, DG XIII-D-5, BREY 7/61
200 rue de la Loi, B-1049 Brussels
Tel: +32 2 235 1936 Fax: +32 2 235 0299

Yes, please send me EDI in perspective EUR 11883
 TEDIS Factsheets EUR 12293

English Français Deutsch
 Italiano Español Ελληνικά
 Português Nederlands Dansk

Quantity:

Name

Company

Address

.....

.....

Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!

S-ro Marc Jeannier, (IKEF 104), St. André B,
Bd. Geoffroy St. Hilaire, F-83400 Hyeres, France/Francio

S-ro Pedro Antonio Macanas Valverde, (IKEF 105),
Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia, España/Hispanio

S-ro Raymond Lhermitte, (IKEF 106), Le Poteau Rouge,
F-56450 Theix, France/Francio

S-ro José Luis Perez Ovilo, (IKEF 107),
Avd. Juan Carlos, I,3, E-30008 Murcia, España/Hispanio

S-ro Prof. Riccardo Stola, (IKEF 108),
via Sette Martiri 6, I-36078 Valdagno (VI), Italia/Italio

S-ro Antanas Puceta - Firmao LWCACSE, (IKEF 109), a/d 444,
SU-233002 Kaunas, Litovio

Plena Pekoteko 1985 -1990

Rüdiger Eichholz intencas libroforme eldoni komence de 1991 ĉiujn registritaĵojn de sia perkomputora termino-kolekto. Li taksas, ke la libro nombros minimume 600 paĝojn (formato A5). La popaĝa prezo estos 0.03 ĝis 0.05 USD (+1 USD por bindokostoj), depende de la eldonkvanto. Antaŭmendoj: R. Eichholz, Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1B0 /RR

La fervojistoj okazigos dum la unua semajno de oktobro la Eŭropan Fervojistan Esperanto-Konferencon. Eblas partopreni tuttempe aŭ nur semajnfine. La ejo nomiĝas "Sol Cress" en SPA, Belgio (1.-7.10.1990). Informojn riceveblas ĉe Lucien de Sutter, Avenue Kersbeek 90, B-1190 Bruxelles/Bruselo

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

La rajtoj de represoj estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

Akiri anoncojn estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: *finance kaj reputacie.* /dk
